
Gazeto Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

21-a Jarkolekto * Aprilo 2004 * N-ro 73

ISSN 1576-0618



ALMODOVAR DEL RÍO

apud Kordovo natura paradizo plena de historio.

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto**.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Armengual de la Mota 33, 4-D, 29007 MÁLAGA.
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: Litopress, Córdoba.

DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ
REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO (Apartado 5184, 29080 MÁLAGA, esperanto@ciudadfutura.com)
José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ (esperanto14@supercable.es)
COLABORADORES: Giordano MOYA, Luis SERRANO PÉREZ, José Antonio VALVERDE MARTÍN, Ángel ARQUILLOS

ENHAVO

Esperanto en Andaluzio. 3
Ekspozicio en Malago pri Heroa Kuracisto 6
Pliaj Tradukistoj ĉe la Eŭropa Unio 8
Programo "Helpo al UEA-Delegitoj" 9
Opinio de la hispanaj kandidatoj al la Eŭropa Parlamento pri la internacia lingvo Esperanto 10
Unuafoje partoprenis Esperanto-Kandidatoj por elekti la eŭroparlamentanojn.....12
Esperantistino Margareta HANDZLIK elektata deputitino en la Eŭropa Parlamento 14
Interlingvistiko: *Mondlango*.....16
Vorta Piramido 21
Poezia Angulo 22
Andaluza Literaturo: *En la buŝo de la kato*.....23
Andaluza Kuirarto 27
Flamenko.....28
Turismi en *Almodovar del Río*.....29
Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio 31
Komercaj Reklamoj.....32

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



ESPERANTO EN ANDALUZIO



JAENO

Kiel jam informite, la pasintan 22an de decembro aperis sur la ĵurnalo JAEN informon sciiganta pri la internacia lingvo esperanto kaj konkrete pri la fondiĝo de Jaena Esperanto-Asocio. Ĉar ne ĉiuj povis legi tiun artikolon, kaj kompreneble ankaŭ ne vidi la fotografaĵon de la du ĉefaj respondeculoj de la asocio, aperanta apud la artikolo, ni aperigas tiun informon sur ĉi tiu paĝo, kompreneble tradukita en esperanton.

ESPERANTO KUN JAENA AKCENTO

Akra milito en Irako, sociaj kaj ekonomiaj konfliktoj nordo-sudo aŭ multaj internaj disputoj en diversaj landoj igas al la politikistoj historie serĉi komunan lingvon por la internacia diplomato.



Foto: Rafael Casas

La serĉo de solvo al tiuj problemoj, laŭ iuj, trovis ĝin la pola kuracisto Ludoviko Lazaro Zamenhof, en la jaro 1887, en komuna lingvo nomita esperanto. Atingi la unuiĝon de la popoloj kaj la kulturoj pere de lingvo estas unu el la celoj al kiuj la esperantistoj sopiras, sed, kio estas esperanto? La radikoj de ĉi tiu artefarita lingvo troviĝas en Pollando, fine de la 19a jarcento. La antikva pola komunumo, apartenanta al Rusa Imperio, estis tuto dividita en malsimilaj popoloj, kiu ajn kun sia propra kutimo kaj propra lingvo. Ĉi tiuj kulturaj kaj lingva diferencoj provokis akrajn problemon, do tio estis sufiĉa kialo por trovi solvon al tiuj problemoj.

Kiam Zamenhof verkis "Fundamento de Esperanto", unua konata libro en ĉi tiu lingvo, li metis la gramatikajn bazojn de internacia, neŭtrala kaj facila lingvo kiu povus esti la unuiga elemento por atingi la egalecon de ĉiuj popoloj. En tiu epoko, kiam la novaj teknologioj estis eĉ ne-imageblaj disvastigi

lingvon estis preskaŭ ne-realigebla revo, sed oni atingis tion. La tradicia poŝto kaj, ĉefe, la partikularaj kontaktoj utilis por disvastigi tra la tuta mondo la gramatikajn regulojn proponitaj de Zamenhof kaj la bazan vortaron de esperanto.
Komence de la 20a jarcento, en 1905, okazis en Francio la unua universala kongreso de esperanto, kiun jaron post jaro renkontigas la esperantistaron en malsimilaj urboj kiel en Fortalezo (Brazilo) aŭ en Pekino. Kontraŭ al tio, kion multaj pensas, esperanto ne estas mortinta lingvo, tute male, ĉar ĝi atingas novajn parolantojn.
Rilate al la vortaro, esperanto havas influojn de la lingvoj romanidaj, germana kaj rusa, inter aliaj, kaj gramatike ĝi estas lingvo proksima al orientaj lingvoj. Ĝi havas 28 literojn, inter ili 5 vokaloj (tute similaj al tiuj de la hispana lingvo) kaj 23 konsonantoj.

Esperanto en Jaeno.
Dudeko da jaenanoj havas la privilegion paroli la tiel nomata lingvon de la mondo. Ĉiuj ili apartenas al la Jaena Esperanto-Asocio fondita la pasintan 14an de aprilo. Estas relative malgranda nombro, sed ili havas grandajn iluziojn atingi sian ĉefan celon, laŭ komentas al ni la prezidanto de la asocio Pablo Foche, tio estas disvastigi la lingvon kaj la kulturon de esperanto en Jaeno, urbo kaj provinco. Por tio, la asocio planas eldoni inform-afiŝojn kaj kompaktan diskon por disdoni ilin al la jaenanoj. Pablo Foche asertas, ke la nombro de esperanto-parolantoj daŭre kreskas kaj li invitas al ĉiuj intresitoj ĉeesti la semajnan renkontiĝon de la asocio por daŭrigi la vivon de lingvo kiu dum pli ol cent jaroj da praktika uzado montras sian taŭgecon por esprimi ĉiujn aspektojn de la homa pensado.
Esperanto estas lingvo komplete fonetika, tio estas, oni legas ĝin kiel ĝi estas skribita, afero tre interesa por faciligi ĝian lernadon. Francisco Díaz de la Torre estas jaenano kiu lernas ĝin ekde antaŭ kelkaj monatoj. Li asertas, ke kiel alia ne-patrina lingvo, estas necesa malgranda peno, sed ĝi ne havas gravajn malfacilaĵojn. Alia avantaĝo de esperanto estas, ke oni povas lerni ĝin aŭtodidakte. Okazas normalaj klasoj, ekzistas libro-metodoj kaj ĉiujaspektaj eldonaĵoj kaj eĉ interreto estas unu el la ĉefaj iloj por lerni ĝin.

CAROLINA RODRÍGUEZ de la ĵurnalo *JAEN*
tradukis J.M.R.H.

SEVILO

- La pasintan Paskon vizitis Sevilon la konata pola filmreĝisoro, verkisto kaj esperantisto **Roman DOBRZYNSKI**. Kelkaj membroj de Sevila Esperanto-Asocio profitis la okazon por renkonti lin.



Roman Dobrzynski pola vizitanto kaj la membroj de la Sevila Esperanto-Asocio José Roldán kaj Antonio Rodríguez

- Ĉiusabate je la 10´30 apud la fontano de la Placo Encarnación en Sevilo renkontiĝas la membroj de la Sevila Esperanto-Asocio. Se interesas iun ĉeesti en ĉi tiuj renkontiĝoj ne hezitu veni. Ni, ĉiusabate, profitas por perfektigi la sciadon de Esperanto kaj ni ankaŭ parolas pri aferoj rilataj al la disvastigo de la internacia lingvo en nia urbo kaj provinco. Vizitu nian TTT-paĝon http://www.sevilo.tk Jen aliaj kontaktiloj :

- telefono: 661 404 120
- elektronika adreso: esperanto_sevilo@yahoo.es

INTERESA EKSPOZICIO EN MALAGO PRI HEROA KURACISTO

j.m.r.h.

Norman BETHUNE (1890-1939) estis elstara kanada kirurgiisto kiu en la jaro 1936 decidis forlasi sian trankvilan postenon kiel respondeculon de la Hospitalo *Sacré-Coeur* en Montrealo (Kanado) kaj aliĝi kiel kuracista voluntulo en la Internaciaj Brigadoj kiuj helpis al la Registaro de la Hispana Respubliko, dum la unua mondmilito li jam servis kiel kuracisto de la kanada armeo sur franca teritorio.

En la jaro 1937 li alvenis kun sia propra ambulanco en la urbon Malagon, kiam la ribelitaj trupoj, helpitaj de la itala faŝisma armeo, aer-bombis la urbon. Li decidis resti en la zono kaj tiel helpi la civilulojn kiuj amase fuĝis el Malago en Almerion.



Norman Bethune hirurgie operacias dum la hispana milito.

La Provinca Deputistaro de Malago ĵus organizis fotografian ekspozicion sub la titolo "Norman Bethune, la krimo de la ŝoseo Malago-Almerio (februaro 1937)". La ekspozicio prezentas 56 blank-nigrajn fotografaĵojn pri la agado de ĉi tiu kuracisto dum la hispana milito kaj konkrete pri tiuj teruraj tagoj en Malago.

Li skribis en siaj memoroj pri la hispana civil-milito: " imagu 150.000 homojn, ĉefe virinoj kaj infanoj, pretaĵ marŝi serĉante la sekurecon de urbo kiu situiĝas je pli ol 100 mejloj. Ekzistas nur unu ŝoseo, la sola loko tra kiu eblas forfuĝi. Tiu ŝoseo stariĝas flanke de alta montaro kaj la maro aliflanke. La urbo kiun oni devas atingi estas Almerio, 200 kmoj for. Forta kaj sana junulo kapablas marŝi piede proksimume 50 kmoj.

tage. La vojaĝo ekigita de tiuj virinoj, maljunuloj kaj infanoj daŭros almenaŭ 5 tagojn. Ili trovos en la trapasotaj vilaĝoj nek manĝaĵojn, ne trajnojn, nek aŭtobusojn. Ili devos piediri kaj ofte ili ŝanceliĝos kun siaj vunditaj piedoj. La faŝistoj lanĉis siajn bombojn el la aviadiloj kaj el la milit-ŝipoj [...] Tiam ni pasis apud virinoj kaj infanoj kaj ni pensis, ke ni devus reveni kaj salvi la plej malsanajn, sed temas pri malfacila elekto.



La hispana milito estas plena je teruraj fotografiaĵoj

Deliraj patrinoj asaltis nian aŭtomobilon petante salvi siajn infanojn, kiuj havis la okulojn kaj vizaĝojn ŝveligitaj pro tiom da tagoj sub la suno. *Prenu ĉi infanon, tiu estas vundita*, ili krias. La infanoj en malpuraj kaj sangaj ĉifonoj, nudpiedaj ploregas terurege pro malsato, doloro kaj elĉerpiĝo. Ducent kilometroj da mizero. Imagu kvar tagojn kaj kvar noktojn kaŝiĝante dumtage en la montaro, ĉar la faŝistoj sekvis ilin per siaj aviadiloj, ili marŝis nur domnokte. Tiam en la ŝoseo marŝis kune la virojn, la virinojn, la infanojn kaj la bestojn. Ofte oni aŭskultis iun kriante la nomon de malaperinta familiano.

Ni decidis vakuigi la ambulancon kaj ĉi tiel krei liberan spacon. Unuamomente ni prenis patrinojn kaj infanojn, sed la disiĝo de la familianoj estis kruela. Do, fine ni transportis la familianojn kun pliaj infanoj kaj ankaŭ la orfajn infanojn, estis centoj da ili tra la ŝoseo. En ĉiu vojaĝo ni kapablis transporti 30 aŭ 40 personojn en Almerion, kie ili ricevis helpon, manĝaĵojn kaj vestaĵojn, kaj tiel dum 3 sinsekvaj tagoj."


La Doktoro Norman BETHUNE estis elstara kuracisto, li inventis la sistemon gardi la sangon por postaj transfuzoj, kaj tiun sistemon li pruvis dum la hispana milito. En la jaro 1938 la Internaciaj Brigadoj foriris el Hispanio. La D-ro BETHUNE marŝis en Ĉinion kie li helpis la ĉinajn gerilistojn kontraŭ la japana okupo. En novembro de 1939 dum rapida hirurgia operacio li tranĉis sian propran fingron kaj la vundo infektiĝis. Li mortis pro sepsemio. En Ĉinio li estas konsiderata kiel nacia heroo sed ankaŭ ĉi tie, en Andaluzio, li realigis sian solidarecon.

Pliaj Tradukistoj ĉe la Eŭropa Unio

La tradukistoj devas ĉen-labori. La pasintan unuan de majo 10 novaj ŝtatoj apartenas al la Eŭropa Unio. En siaj valizoj ili alportas naŭ lingvojn kiuj devas esti adiciitaj al tiuj 11 lingvoj jam oficialaj ene de la Unio. Do, la sidejo de la eŭropa organizo fariĝos vera Babel-Turo, ĉar estos eble aŭskulti en la salonoj, koridoroj kaj kunvenejoj 20 lingvojn. Por kovri la mendadon la Eŭropa Unio devos dungi, minimume, la duoblon de la numero de tradukistoj hodiaŭ laborantaj, ili estas nun 1.300. Ankaŭ entreprenistoj kaj elektristoj plibonigos siajn ekonomiajn rezultojn, ĉar estos necese starigi novajn budojn, skribo-tablojn kaj fonoforojn por la samtempa tradukado en la kunvenoj de Bruselo, Luksemburgo kaj Strasburgo.

Jen kelkaj ciferoj:

La Eŭropa Unio havas 1.300 tradukistojn. Ili tradukas pli ol unu milionon kaj duonon da paĝoj ĉiujare. Post la unua de majo, la nombro da tradukistoj duobliĝos. Oni kalkulas, ke ili tradukos du milionojn kaj duonon da paĝoj ĉiujare. La laboro estos giganta, ĉefe se ni scias, ke ezistas 190 eblaj kombinoj inter la 20 lingvoj nun oficialaj. Estas malfacile trovi tradukiston kiu samtempe regas la portugalan, la finnan, la grekan kaj la latvan lingvojn. Pro tio, la dokumentojn oni ne povos traduki el la originala lingvo, sed ĉen-labore. Ekzemple, Ĉeka tradukisto devos atendi la tradukon en alian lingvon de la latva teksto, ĉar estos malfacile trovi tradukiston kapablan traduki en la ĉekan el la latva. Do, se ekzistas eraro en la unua traduko ĉiuj postaj tradukistoj same eraros, asertis al la brita televid-kompanio BBC Jana Jalvi, latva tradukistino.



Do, pli-malpli, okazos kiel en tiu infana ludo konsistanta en la susurado de frazo ĉe la orelo de infano post infano, la parolanto scias kion li diris, tamen tute ne scias kion fine komprenis la lasta ricevanto de la mesaĝo. Sed tio, kio estas plenĝojiga infan-ludo, povas esti katastrofa se ni scias, ke ĉiu vorto havas specialan valoron en la internaciaj rilatoj. Ni memoru tiun

germanan parlamentanon kiu forĵetis furioze sian fonoforojn post aŭskulti la tradukadon de la vortoj de la itala premiero Silvio Berlusconi kiu komparis lin kun la gardistoj de la naziaj koncentrejoj.

Jen kelkaj solvoj :

Kelkaj eŭroparlamentanoj proponis adopti komunan kaj neŭtralan lingvon por la Eŭropa Unio, kelkaj eĉ rekomendis la uzadon de Esperanto. Aliaj opinias, ke la plej logika labor-lingvo estus la angla, ĉar ĝi estas la dua plej populara lingvo en la mondo. Tio kio ja estas certa, estas la fakto, ke la Eŭropa Parlamento estas la malplej bona loko por trovi reprezentantojn kapablaj paroli du lingvojn (aŭ eĉ pliaj), ĉar la parlamentanoj estas elektataj pro politikaj aferoj kaj ne pro sia kapablo uzi du lingvojn.

Resume, nova armeo de tradukistoj provos solvi la lingvan ĥaoson kiu baldaŭ ekzistos en la Eŭropa Unio.

PROGRAMO "HELPO AL UEA-DELEGITOJ"

Memoru, ke Andaluzia Esperanto-Unuiĝo ekigis kampanjon por subvencii tiujn personojn kiuj estas pretaj aliĝi al Universala Esperanto-Asocio kaj esti UEA-delegitoj en sia urbo, sub la jenaj kondiĉoj:

1) Andaluzia Esperanto-Unuiĝo pagus la 60% el la jara kotizo kiel individua membro de tiuj personoj kiuj estas aŭ estos UEA-membroj kaj fariĝos delegitoj de tiu universala asocio en sia urbo.

2) Unuamomente oni subvencios nur unu personon po andaluza provinco, krome tri aliaj de Jerezo, Algeciras kaj Linares.

3) Ne povos peti ĉi tiun subvencion tiuj kiuj jam estas UEA-delegitoj en iu andaluza urbo.

4) Andaluzia Esperanto-Unuiĝo nur oferas ĉi tiun subvencion dum la du unuaj jaroj de aliĝo al Universala Esperanto-Asocio. Tamen, se la monaj eblecoj tion permesas la subvencio daŭriĝus dum postaj jaroj.

5) Nur povos peti ĉi tiun subvencion la membroj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

Opinio de la hispanaj kandidatoj al la Eŭropa Parlamento pri la internacia lingvo Esperanto

Antaŭ kelkaj semajnoj Andrés MARTÍN, prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, kaj Manuel ORTEGA de la Sevila Esperanto-Asocio sendis al la reprezentantoj de la diversaj hispanaj partioj aŭ koalicioj elektronikajn mesaĝoj demandante pri iliaj opinioj rilate la eblan uzon de la internacia lingvo Esperanto ene de la Eŭropa Unio. Oni ricevis kelkajn respondojn kiuj, pro la graveco de la respondintoj, ni prezentas en ĉi tiuj paĝoj speciale dediĉitaj al la ĵus okazitaj balotoj al la Eŭropa Parlamento (junio 2004). Kompreneble ni prezentas la tradukon en esperanton de tiuj respondoj ricevitaj en la hispana aŭ en la kataluna lingvo.

JOSEP BORREL FONTELLES

Ni deziras plifortigi ĉiujn eŭropajn lingvojn. Ĉi-sence, la hispana lingvo, ĝia defendo kaj stimulado estos unu el niaj ĉefaj agad-planoj. Ankaŭ, ni laboros por ke la estonta Eŭropa Konstitucio aperigos en sia artikolaro ĉiujn niajn oficialajn lingvojn. La angla lingvo devas esti unu el niaj ĉefaj celoj en la edukad-sistemo de la membro-ŝtatoj kaj tio estas por la nova socialista registaro: ni deziras, ke niaj filoj regos la anglan lingvon kiel faktoro por atingi samajn ŝancojn en ĉi tiu socio ĉiutage pli tutmondigita.

JAIME MAYOR OREJA

Esperanto estas interesa projekto. Tamen, ĝi ne posedas la necesajn karakterizaĵojn por esti lingvo parolata de la eŭropanoj (t.e. kultura bazo, literaturo, ĝenerala uzado). Ĉiukaze, mi pensas, ke malfacile, se ne tute maleble, estus atingi, ke ĉiuj ŝtatoj akordiĝos rilate la elekton de unika oficiala lingvo.

WILLY MEYER PLEITE

Rilate la rolon de Esperanto, ja mi ne dubas, ke ĝi povas esti elemento helpanta la adheron de la malsimilaj identecoj, kvankam ĉiam oni

devas defendi la lingvan kaj kulturan riĉecon de ĉiu popolo.

ALEJANDRO ROJAS MARCOS
(de la koalicio COALICIÓN EUROPEA, en Andaluzio PARTIDO ANDALUCISTA).

Oni ne povas trudi la anglan lingvon en la labora sfero. Rilate la taŭgecon aŭ ne de Esperanto, ni pensas, ke estas necese studi tiun aferon atente. Sed tio al kio ni kontraŭstaras, estas al la diskriminacio.

BENART JOAN I MARÍ
(de la koalicio EUROPA DE LOS PUEBLOS, en Andaluzio PARTIDO SOCIALISTA DE ANDALUCIA

Tutklare, mi apogos ĉion rilata al la antaŭenirigo de Esperanto. Mi konsideras, ke ĝi estas la lingvo plej "neŭtra" por disvolviĝi en Eŭropo.

ALIAJ OPINIOJ:

Luisa FERNANDA RUDI (Partido Popular)

Estas ne-eviteble, ke la angla gajnos terenon al la franca lingvo en konkretaj aferoj. Nu, en ĉiuj institucioj ekzistas traduk-servoj dum la renkontiĝoj kaj oni tradukas ĉiujn dokumentoj por garantii, ke ĉiuj lingvoj estas uzataj en la laboroj de la institucioj. Rilate la adopto de sola lingvo, estas malfacila afero, se ne malebla. Estas malfacile atingi, ke ĉiuj membro-ŝtatoj akordiĝos rilate ĉi temon.

RAÜL ROMEVA RUEDA (Izquierda Unida – Los Verdes)

Malfacile Esperanto povas doni solvon al la lingva diskriminacio ekzistanta en la Eŭropa Unio, ĉar ĝi estas lingvo nenies uzata.

XESÚS CAÑEDO VALLE (Coalición Europea)

Rilate la plifortigon de Esperanto kiel interlingvo, ni ne kontraŭstaras al ĝia aperigo ene de la eŭropaj lingvaj programoj, kvankam tutsincere kaj miaopinie, mi estas skeptikulo rilate ĝian eblecon.

Unuafoje partoprenis Esperanto-Kandidatoj por elekti la eŭroparlamentanojn

Unuafoje partoprenis en la balotoj por elekti la membrojn de la Eŭropa Parlamento, kandidatoj sub la listo nomita "Eŭropo-Demokratio-Esperanto". Ili prezentiĝis en la 7 disktriktoj laŭ kiuj Francio estas dividita okaze de ĉi tiuj balotoj. Entute ili atingis 25.060 voĉdonojn. Malgranda cifero se ni konas la rezultojn de la plej grandaj partioj en Francio kaj en la ceteraj ŝtatoj, sed grandega sukceso, se ni scias, ke temas pri la unua partopreno de kandidatoj kiuj ĉefe defendis la uzadon de la internacia lingvo Esperanto en la Eŭropa Unio. Jen artikolo de MARIE-FRANCE CONDE REY pri la partopreno de "Eŭropo-Demokratio-Esperanto" en la pasintaj balotoj por elekti la eŭroparlamentanojn.

TURNOŜTONO SUR LA VOJO DE EŬROPA UNIO

Post la kampanja tumult, la franca esperantistaro silentas. Ĉu pro elĉerpiĝo? La historie rimarkinda baloto por elekti la deputitojn al la Parlamento de Eŭropa Unio entenis sep listojn de la "partio" Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE), kiuj kovris la tuton de la franca metropola teritorio.

Unuavide la rikolto magras, ĉie la procentoj ne atingas 0,5, krom du esceptoj. Tamen la legado de la rezultoj ne donas saman bildon, se oni rigardas la sep superrgionojn difinitajn por tiu baloto, aŭ la 22 administrajn regionojn, aŭ kelkajn apartajn urbojn.

Tiel, el la superregionoj, la elstara montriĝas la Orienta, kun 0,24%, kaj ene de ĝi Elzaco supreniris al 0,31%. Kvankam ne ankoraŭ konataj kaj analizitaj la streboj kaj klopodoj de ĉiu EDE-listo, oni povas konjekti, ke tie refalis la efiko de la ĵus okazinta "Eŭropa Bunto" (Vd. *Heroldo de Esperanto* 2054), por kiu la loka gazetaro amplekse kaj pozitive raportis.

Ĉe la alia fino de la vico, oni trovas la Nordan superregionon, kun zorgige malalta rezulto: 0,03%. Tie plej forte ludis la influo de UFE, la landa asocio de UEA, kies prezidanto nordevena voĉdonigis ĉe la Komitato en septembro 202 rezolucion kontraŭ la projekto EDE. Ne nur en la UEA-medio, cetere, sed ankaŭ en tiu de SAT la iniciato estis kontrastata. Ĉe ambaŭ tio montris nekomprenon pri la evoluo de la socio, tras la skemoj de la partia framo kun ĝenerala lobiado ĉiudirekten, kaj pli proksime al la

"herboradika", civitanara iniciato.

Tamen, pli ol la portema kampanjo, pli ol la interesaj artikoloj, pli ol la apogo de Esperantistaj instancoj, la baza helpo al la baloto venis de la enradikiĝo de Esperanto, de la nombro da Esperantistoj (eĉ se kelkaj politike engaĝitaj ne perfidis sian partion), de la nombro da subtenantaj simpatiantoj, de la nombro da bone informitaj voĉdonantoj, kuj jam ekkonsciiis pri la lingva problemo de EU. Kiam la kritikantoj denuncis la emon de la francaj Esperantistoj uzi la baloton por propagandaj celoj, ili parte pravis. Fakte la televidaj oficialaj anoncoj donis novan impulson al la tuta franca Esperanto-Movado. Sed ili ne vidis, ke EDE kapablis produkti originalan programon, substrekante la nunajn malfortajn flankojn de la Eŭropa konstruado: la manko de efektiva partoprenado de la bazaj civitanoj, kaj sekve la troa distanco inter ili kaj la decidpovaj strukturoj.

Eksteraj observantoj rimarkis kun miro, ke eblas konduki ĝis fine balotan kampanjon se la subteno de politika partio. Jes eblas, dank´al la reta organizado de la sulrokaj fortoj, kaj al iliaj konviko kaj sindonemo.

Fine rigardu ni du lokajn rezultojn. Saint-Brieuc (Bretonio), la urbo de la ĉefkandidato de la Okcidenta regiono, Denis-Serge Clopeau, atingis la rekordon 0,77% ; kaj Romans-sur Isère (Rodan-Alpoj) Sud-Oriento, kiu NE estas la urbo de la ĉefkandidato kaj kreinto de la projekto, Kristian Garino, ricevis 0,56%. Oni povas veti, ke te Esperanto ja bone enradikiĝis.

La sekvoj de tiu nekutima evento antaŭvideblas en pluraj direktoj. Krom al malfortigo de la lobia agado de UFE (Unuiĝo Franca por Esperanto) ĉe preskaŭ ĉiuj politikaj partioj, restos netakseble altvalora sperto, kiu certe utilos por la venonta baloto post 5 jaroj, kondiĉe ke la ontaj EDE-kandidatoj ne lasu la nunajn rezultojn malkuraĝigi ilin. Kaj eble aliaj landoj en EU, ke Esperanto multe pli viglas ol en Francio, ampleksigos la strebon de respondecaj civitanoj port Esperanton for de la hobia sfero. De nun al 2009, fluos la tempo, la eŭropaj riveroj kaj la malfacilaĵoj. Ek al la laboro !

Noto de la Redakcio:
Okaze de la ĵus okazintaj Balotoj por la EŭroParlamento ankaŭ en Germanio oni laboris por partoprenigi kandidatojn de "Eŭropo-Demokratio-Esperanto". Sed, bedaŭrinde, la germanaj leĝoj petas 4.000 subksriboj de apogantoj kiam temas pri la partopreno de malgrandaj partioj aŭ koalicioj. Ĉi-kaze la germanaj apogantoj de EDE nur atingis kolekti 2.700 apogantojn, do ili ne povis partopreni kiel EDE-kandidatoj en Germanio.

Esperantistino Margareta HANDZLIK elektata deputitino en la Eŭropa Parlamento

Unu el la kandidatinoj elektataj por esti deputitino en la Eŭropa Parlamento reprezentanta Pollandon estas la esperantistino Margareta HANDZLIK. Ŝi deziras alporti jenajn precizigojn pri ŝi mem kaj pri sia onta laboro:



MI.
Mia nomo estas Malgorzata HANDZLIK, esperantistoj nomas min Margareta. Mi estas la edzino de Georgo HANDZLIK, la esperanta kantisto, verkisto, eldonisto kaj instruisto. Esperanton mi parolas 20 jarojn. Mi vizitis UK-ojn en Berlino kaj Montpeliero, krome multajn lokajn aranĝojn. Dum du monatoj mi kun mia familio estis en Brazilo invititaj de gesinjoroj Grattapalia, en Bona Espero.
Mia TTT-paĝo: www.Malgorzatahandzlik.com

POLITIKO.
Mi neniam agis en politikaj partioj. Nur dum la kampanjo mi aliĝis al Civitana Platformo (Platforma Obywatelska). En Eŭropa Parlamento mi agos en la plej granda francio EPP Eŭropa Popola Partio. Kelkaj samideanoj skribis, ke mi estas la unua esperantisto-membro de Eŭropa Parlamento. Mi ne kontrolis tion. La kampanjon ni faris dum du monatoj kaj mi gajnis unu el la plej bonaj rezultoj en la lando.

ESPERANTO POR EŬROPA UNIO
Dankon pro sugestoj, ke mi zorgu en EP pri Esperanto. Tio evidente estas unu el miaj intencoj. Por efikdone agi mi nun volas aliĝi al la Komisiono pri Kulturo, Edukado, Junularo kaj Sporto, kiu inter la aliaj okupiĝas pri lingvoj. Tio fakte ne estas facila tasko, ĉar estas multaj voluntuloj al la komisiono. Kaj la decido apartenas ne nur al la parlamentano, sed ankaŭ al la partio.
Krom salutoj venis al mi kelkaj mesaĝoj kun proponoj kunlabori internacinivele pri kulturo, ankaŭ venis al mia retadreso kelkaj gratuloj al Civitana Platformo pro elekto de esperantistino al EP. Mi prezentos ilin al la estroj de la partio, eble tio subtenos miajn strebojn eniri en la Komisionon pri Kulturo.
Krom esperantaj amikoj en ĉiuj eŭropaj landoj mi havas aliajn kompetencojn por la Komisiono pri Kulturo,Junulara,Edukado kaj Sporto, pro la jenaj

faktoj:

- jam dudek jarojn mi gvidas radion.
- mi fondis instituton por instrui instruistojn.
- mi fondis lingvo-lernejon.
- mi profesie laboris en skolta movado.

Mi estos dankema pro ĉiu mesaĝo kun propono kunlabori sur kultura kampo internacia.

Se mi eniros la Komisionon pri Kulturo mi havos realan ŝancon pledi por Esperanto. Tiam volonte mi diskutos kaj renkontiĝos kun ĉiuj, kiuj havas spertojn pri lobingo (premagado) por Esperanto ĉe EP.

Sincere.
Margareta Handzlik.
Eŭrodiputito

Memoru ke, krom nia Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, jam ekzistas organizita esperanto-movado en la jenaj provincoj. Ne hezitu kontakti kun tiuj grupoj por perfektigi vian sciadon pri la internacia lingvo kaj por helpi en la plifortigo kaj disvastigo de nia movado en via provinco. Se ni ĉiuj laboras kune ni sendube sukcesos en nia laboro.

- MALAGO:	Andaluzia Esperanto-Unuiĝo	andresper@teleline.es
- SEVILO:	Sevila Esperanto-Asocio	esperanto_sevilo@yahoo.es
- KORDOVO:	Kordova Esperanto-Asocio	esperanto14@supercable.es Apartado de Correos 3142 14080 Córdoba
- JAENO:	Jaena Esperanto-Asocio	esperanto-jaen@yahoogroups.com
- ONUBO	Onuba Esperanto-Asocio	EsperantoenOnubo@groups.msn.com

Ĉu baldaŭ en GRANADO???? Ni pluinformos !!!!

INTERLINGVISTIKO

MONDLANGO

Ĉu esperanto povas havi dialektojn? Miaopinie, mi devas diri, ke ne. Kiel la naturaj lingvoj esperanto povus havi dialektojn nur se ĝi estus amase parolata de malsimilaj personoj, kaj ĉiam prefere kiel unua lingvo, ne kiel help-lingvo. Malgraŭ tio, oni devas agnoski, ke tiu povus okazi, tamen la spirito de la lingvo mem, t.e. ĝia pretendo utili kiel universala komunikilo, malebligus tiun eblecon dialektigi esperanton.

Tio kio ja vere okazas estas, ke povas aperi (kaj ofte ili aperis) malsimilajn projektojn kiuj naŭdeknaŭprocente baziĝas sur esperanto. Tio okazis ekde la unuaj jaroj de la apero de nia lingvo, kaj ili ankoraŭ aperas.

Unu el tiuj projektoj estas Mondlango, ankaŭ konata kiel Ulango (la universala lango). Ĝi estas kreaĵo de kelkaj personoj, sed la plej grava inicianto estas la ĉina tradukisto He YAFU. Kiel li mem asertis, Mondlango ests specife Esperanto + Angla Lingvo. La celoj de la inicianto de ĉi tiu lingvo estas tute similaj al tiuj de esperanto. T.e. utili kiel internacia kaj neŭtrala lingvo por la tuta mondo. Ekzistas ankaŭ la *mondlangismo*, movado bazita sur la respekto al la Universala Deklaro de Homaj Rajtoj kaj la ideo disvastigi ĉi tiun novan lingvon.

GRAMATIKO

Alfabeto.
a-b-c-d-e-f-g-h-i-j-k-l-m-n-o-p-q-r-s-t-u-v-w-x-y-z
La sono de ĉiuj literoj estas similaj al tiuj de esperanto, escepte:
j = esperanta ĝ
q = hispana q, en esperanto ku
w = hispana w, en esperanto u
x = esperanta ks
y = esperanta j

Artikolo.
Ekzistas nur la difinita artikolo LA, tute simila al tiu esperanta, do ĉi tiu artikolo egalas por singularo kaj pluralo kaj por ĉiuj genroj.

Pluralo.
Oni adicias la literon S por formi la pluralon.
libro = libro *libros* = libroj
domo = domo *domos* = domoj

Sustantivoj.
Kiel en esperanto, la sustantivoj en mondlango finiĝas per la vokalo O.
arbo = *arbo* homo= *humo*
tablo = *tablo* maŝino = *maxino*
lingvo = *lango* floro = *floro*

Adjektivoj.
La adjektivoj finiĝas per la vokalo A
bona = *guda* granda = *biga*
alta = *alta* interesa = *interesa*
La adjektivoj ne ricevas la pluralon S

tiel,
blanka domo = blanka domo
blanka domos = blankaj domoj

Personaj Pronomoj.
Mi = *mi* Ni = *mu*
Vi = *yi* Vi = *yu*
Li = *hi* Ili (pluralo de Li) = *hu*
Ŝi = *xi* Ili (pluralo de Ŝi) = *xu*
Ĝi = *ji* Ili (pluralo de Ĝi) = *ju*
Li + Ŝi = *li* Pluralo = *lu*

Posesivaj Pronomoj
Posesivajn adjektivojn oni formas aldonante la finaĵon A al la personaj pronomoj:

mia libro = mia libro
yia domo = via domo

Verboj.
Vidi = vidi *Legi* = legi
La infinitivo finiĝas per I

AS-tempo
mi legan = mi legas
yi legan = vi legas

IS-tempo
mi vidin = mi vidis
yi vidin = vi vidis

OS-tempo
mi legon = mi legos
yi legon = vi legos

US-tempo
mi leguz = mi legus
yi leguz = vi legus

U-tempo
Venez = venu

Demandoj.
Por formi demandojn oni metas la vorton CU (simila prononco al la esperanta cu), antaŭ la frazo.

Cu la kato manjan musos?
(Ĉu la kato manĝas musojn?)

Yes, la kato manjan musos
Ne, la kato ne manjan musos

Aliaj vortoj por demandi.
Kio = kio
Kio esan katos?
Katos esan bestos

Kiu = kiu
Kiu xi esan?
Xi esan mia matro

Kie = kie
Kie esan yia libro?
Mia libro esan sur la tablo

Kiam = kiam
Kiam venon hia spozino?
Hia spozino venon balde.

Kial = kial
Kial yi lernin mondlango?
Mi lernin mondlango car ji esan bela lango.

Numeroj.
1 = *un*
2 = *bi*
3 = *tri*
4 = *kwar*
5 = *kwin*
6 = *siks*
7 = *sep*
8 = *ok*
9 = *nev*
10 = *dek*
11 = *dek-un*
12 = *dek-bi*
13 = *dek-tri*
20 = *bidek*
21 = *bidek-un*
22 = *bidek-du*
30 = *tridek*
40 = *kwardek*
100 = *cent*
1.000 = *mil*

4.398 = kwarmil-tricent-nevdek-ok

Ordinalaj nombroj estas formataj aldonante la finaĵon A

unua, bia, tria, kwara, kwina....

Sufiksoj.

esperanto	*mondlango*
an	*an*
ej	*ey*
in	*in*
iĝ	*is*
ig	*iz*

Ne bazita en esperanto sed en Ido: la sufikso UL kiu montras la vir-genro, ekzemple: *onklulo* = onklo
onklino = onklino

EKZEMPLOJ

Cu yi parlan Mondlango?
Ĉu vi parolas mondlangon ?

Yes, mi parlan Mondlango ay Esperanton.
Jes, mi parolas Mondlangon kaj Esperanto.

Kiam yi lernin Mondlango ay kiam Esperanto?
Kiam vi lernis Mondlangon kaj kiam Esperanton?

Mi lernin Mondlango pre unu weko, ay mi lernin Esperanto la past yero.

Mi lernis Mondlangon antaŭ unu semajno kaj mi lernis Esperanto la pasintan jaron.

Oni diran, ke hi ne nidan awto car hia oficeyo esan tre proksa.
Oni diras, ke li ne bezonas aŭtomobilon ĉar sia oficejo estas tre proksima.

PRAKTIKU VI MEM
PRAKTIKEZ YUSELF

La awto de mia patro esan tre rapida

(~~La aŭtomobilo de mia patro estas tre rapida~~)

If yu deziran aceti nova domo yu devon gayni multa monio

(~~Se vi deziras aĉeti novan domon vi devos gajni multe da mono~~)

La arbos de xia gardeno esan alta

(~~La arboj de ŝia ĝardeno estas altaj~~)

Esan disfacile vivi sen komputilos ay sen awtos.

(~~Estas malfacile vivi sen komputiloj kaj sen aŭtomobiloj~~)

Mia patro pensas, ke libro esan mor utila ol gazeto

(~~Mia patro pensas, ke libro estas pli utila ol gazeto~~)

La arboj estas grandaj

(~~la arbos esan biga~~)

Via patro vizitos mian urbon.

(~~Yia patro viziton mia urbo~~)

La trajno estas pli rapida ol la aŭtomobilo.

(~~Wagonaro esan mor rapida ol la awto~~)

Ĉu vi preferas kafo aŭ teo?

(~~Cu yi preferas kafo aw teo?~~)

Daŭrigante nian kompletan internacilingvan am-deklaran vortaron, sciu, ke se Vi havas amaton aŭ amatinon parolanta Mondlangon, Vi devos diri al li / ŝi:

MI LOVAN YU

Por informi al ĉiuj eblaj interesitoj pri la internaciaj lingvoj ĝis nun pritraktitaj sur la rubriko "Interlingvistiko" de ĉi tiu revuo, jen kompleta listo:

VOLAPÜK (n-ro54)
SOLRESOL (n-ro 55)
NOVIAL (n-ro 56)
OCCIDENTAL (n-ro 57)
LATINO SINE FLEXIONE (n-ro 58)
IDO (n-ro 59)
UNITARIO (n-ro 60)
RO (n-ro 61)
INTERLINGUA (n-ro 62)
NEO (n-ro 63)
GLOSSA (n-ro 64)
LING (n-ro 65)
PICTO (n-ro 66)
VIKTO (n-ro 67)
AUXIL (n-ro 68)
PANROMAN (n-ro 69)
FRATER (n-ro 70)
ROMANOVA (n-ro 71)
FRENDO (n-ro 72)
MONDLANGO (ĉi-numere)

Se Vi ŝatas ĉi tiun rubrikon kaj mankas al Vi la paĝoj dediĉitaj al unu aŭ kelkaj el tiuj help-lingvoj, ne hezitu peti ilin al la jena adreso:

Sekcio INTERLINGVISTIKO
Gazeto Andaluzia
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

aŭ al esperanto14@supercable.es

VORTARO	*WORDARO*
Akvo	*hidro*
Alia	*alia*
Ami	*lovi*
Amiko	*amiko*
Antaŭ	*pre*
Aŭ	*aw*
Aŭdi	*awdi*
Aŭtomobilo	*awto*
Bela	*bela*
Birdo	*birdo*
Blua	*blua*
Bona	*guda*
Bone	*gude*
Ĉar	*car*
Ĉiam	*ciam*
Ĉi tie	*ci tie*
Ĉi tiu	*ci tiu*
Danci	*dansi*
Dankon	*danko*
De	*de*
Devi	*devi*
Dika	*dika*
Dio	*Godo*
Domo	*domo*
Doni	*doni*
En	*en*
Esti	*esi*
Facila	*facila*
Fantazio	*fantaso*
Flugi	*flugi*
Forta	*forta*
Frato	*fratulo*
Frua	*frua*
Granda	*biga*
Havi	*havi*
Hodiaŭ	*hodie*
Homo	*humo*
Infano	*infano*
Inter	*inter*
Iri	*iri*
Jes	*yes*
Juna	*yuna*
Ĵurnalo	*jurnalo*
Kaj	*ay*
Kelka	*kelka*
Kiam	*kiam*
Kie	*kie*
Kio	*kio*
Kiu	*kiu*
Knabo	*kidulo*
Knabino	*kidino*
Kun	*kum*
Labori	*worki*
Letero	*letero*
Libro	*libro*
Lingvo	*lango*
Longa	*longa*
Maljuna	*disyuna*
Manĝi	*manji*
Mano	*mano*
Maro	*maro*
Mateno	*morno*
Monato	*mono*
Ne	*ne*
Neniam	*niam*
Nomo	*nomo*
Nova	*nova*
Pano	*pano*
Paroli	*parli*
Patrino	*matro*
Patro	*patro*
Per	*per*
Persono	*persono*
Por	*por*
Post	*pos*
Povi	*povi*
Pri	*pri*
Rapida	*rapida*
Respondi	*respondi*
Seĝo	*sejo*
Skribi	*skribi*
Studi	*studi*
Sinjoro	*mistulo*
Sub	*sub*
Tago	*tago*
Trinki	*trinki*
Vidi	*vidi*
Virino	*humino*
Viro	*humulo*
Vivi	*vivi*
Voli	*voli*
Vorto	*wordo*
Lundo	*lundo*
Mardo	*mardo*
Merkredo	*merkredo*
Ĵaŭdo	*turzdo*
Vendredo	*frido*
Sabato	*saturdo*
Dimanĉo	*sundo*
Januaro	*januaro*
Februaro	*februaro*
Marto	*marto*
Aprilo	*aprilo*
Majo	*mayo*
Junio	*juno*
Julio	*julio*
Aŭgusto	*awgusto*
Septembro	*septembro*
Oktobro	*oktobro*
Novembro	*novembro*
Decembro	*decembro*
Printempo	*printempo*
Somero	*somero*
Aŭtuno	*awtuno*
Vintro	*wintro*

VORTA PIRAMIDO

1 □

2 □ □

3 □ □ □

4 □ □ □ □

5 □ □ □ □ □

6 □ □ □ □ □ □

7 □ □ □ □ □ □ □

8 □ □ □ □ □ □ □ □

9 M □ □ □ □ □ □ □ J

1. La unua.
2. Sen la lasta vokalo, maŝino uzata por enbati fostojn.
3. Sen la lasta vokalo, inklino al iu.
4. Vasta etendaĵo da sala akvo.
5. Adjektive, agrabla odoro.
6. Adjektive, sen regula strukturo.
7. Proksima.
8. Plurale kaj adjektive, rilate al la formo.
9. Debilaj.

Komencante per la plej suba linio (la n-ro 9), Vi devas skribi la vorton laŭ la difino. Por formi la vorton de la linio 8 oni uzis la samajn literojn de la linio 9 plus alia litero. Ĉi tiel simile por formi la liniojn 7,6,5...1. Ni sciigas al Vi la unuan kaj la lastan literon de la unua vorto.

FORVIŜITA TEMPO

Terura momento !
Vi estas malbena,
mistera fiulo trapasis la limon
forviŝis la tempo,
do, mi bonvenigas nur sunon
nur venton kaj pluvon,
sed vi...
Vi estas dolor´
vi estas turmento
vi estas malam´
kaj mi jam ne havas
por vi eĉ momenton.
Forkuru !
Ne haltu forkuri !
Kaŝiĝu maltaŭ la mondo
kaj lasu min sola,
per ama fadeno, kudranta la oron
pro vi detruita...
Permesu min plori !
Permesu, mistera sinjoro,
akvumi per larmoj,
la pasintan tempon,
kaj poste,
per silka mantuko
sekigi ĝin tute
kaj fiere purigi
kun helpo de l´pluvo
kaj l´vento, ĝin tute
el malpura sento.

ANGEL ARQUILLOS, junio 2004

ANDALUZA LITERATURO

(tradukita en esperanton)

EN LA BUŜO DE LA KATO

de MANUEL HALCÓN
trad. J.M.R.H.

Don Pascual de la Baranda diris, laŭ li skribis en unu el siaj leteroj adresitaj al siaj ekziliita amiko, ke, la domoj estas la familio, kaj la familio la domoj; tamen se la familio estas familioj kaj ili donas neniun krediton al tio kio tio ne estas, la domoj povas loĝigi familiojn kaj al tio kio ne estas tio, ekzemple fraŭlo.

Kiam la komunumaj registaroj malpermesos la "unu-personajn restadejojn" mi jam estos forpasita, asertis en unu el siaj lastaj leteroj Don Pascual, kiu nuntempe vivas akompanita de du hundoj kaj kastrita kato. Li jam kalkulis ĉion. Kiam mankos al li la sano aŭ la mono li mortigos siajn du hundojn kaj la katon, li entombigos ilin sub tombejo jam fosita ĉe la ĝardeno, hodiaŭ kovrita de densa herbaro, li, poste, pafos kontran sian tempion ĝuste antaŭ la spegulo por decidi korekte pri la loko. Li ne ŝatas la ideon pafi kontraŭ sian palaton.

Ĉi tiuj jaroj, se li sukcese daŭrigas sian vivon, povas supozi granda profitaĵo eltirita al sia vivo. Jen liaj celoj en la monato junio 1978, dum la reĝado de Johano Karlo la 1-a kaj sub la regado de Adolfo Suárez. Don Pascual de la Baranda estas konservativulo kaj respublikano; en la lasta letero adresita al sia ekziliita amiko li skribis: "mi kredas, ke la registaro de la disdonema Suárez kondukas Hispanion en la socialismon, kaj li restos ene de ĝi, kaj maldekstra partio nomigos avenuon per lia nomo, kaj la Reĝo eĉ donos al li markizan titolon. Poste alvenos tio kio jam estas konata: la milionuloj forlasos Hispanion kaj ni,




tiuj kiuj disponas pri malgranda kapitalo, malsupreniros en proletan socian klason, sed tio ne signifos, ke la trinkejoj vakuiĝos aŭ ke la aŭtovojoj izoliĝos".

Tion li opiniis kaj Don Pascual ekpripensis la ideon pafi kontraŭ sian tempion kaj buĉi siajn bestojn. Kiom da valoro havos la peseto post kvin jaroj? Kiom da mono estos necesa por butikumi? Tiu papero kun cifero necesa por pagi kiel propietulo de tiu domo,

unupersona restadejo kun ses ĉambroj kaj ĝardeno, malekvilibrigos sian buĝeton tiel zorgeme pripensita kun la kunlaboro de lia amiko, tiu de la banko kaj lia kuracisto.

Li ĉiam kalkulis, ke li postvivus al siaj bestoj. La hundoj jam estis okjaraĝaj, ankaŭ la kato, ekzakte la sama tempo ekde kiam li ekloĝis en tiu domo pagita de siaj ŝparoj kiel funkciulo, eble tro granda domo por li. Li erariĝis kiam li planis konstrui domon en la vilaĝo kie li somerumis, anstataŭ aĉeti dometon en Madrido, ĉar en Madrido li ne ŝajnus esti riĉa, sed ja en la vilaĝo, kun tiu fasado, tiel mistera, fronte al la strato, nur kun tri truoj, la enir-pordo kaj du bov-okuloj kun kolOrigitaj kristaloj protektataj de krado kaj drat-kloŝo por eviti la ŝtonojn.

Don Pascual konstruigis koridoron tra la fasado por eviti la nordon, la cetera konstruaĵo orientiĝas suden kaj oni videblas la ĝardenon tra kvar fenestroj. La konstruaĵo estas unu-etaĝa. La arboj, entute kvin, somer-ombrigas la muron kaj vintre sunigas ĝin.



"La kaduk-foliaj arboj estas starigitaj ĝuste pro tio, poste kaj ne antaŭ kiam la homoj ekkonstruis la unuajn domojn" li leteris al sia amiko rakontante ĉion. Li bezonegis lian respondon. Li respondis: "tute ne planktu eŭkaliptojn, ĉar tio detruus vian domon".

La ekziliita amiko skribis al li, nostalgie, "plejeble kiam vin regos registaro vere socialisma mi vizitos vin kaj mi povos montri mian antikvan membro-karton, kiuj jam estas relikvo, sed ĉu vi vidos finfine socialisman registaron?"

"Ne, ni ne vidos tion" respondis Don Pascual.


" Ni aŭdos multe pri ĝi, sed jam ne restas al mi tempo, malgraŭ la favoraj kondiĉoj de Suárez. La registaro havas duoblan taskon, unue ĝi devas fari la povon dezirebla, kaj pro tio estas necesa unu aŭtomobilo po persono. Tio estas, la socialisto devas sopiri burĝan ekonomian idealon, mi parolas pri la nuntempa socialismo. Samtempe la burĝa registaro de Suárez bezonas malriĉigi la burĝaron por ne fari la revolucion dezirebla. Suárez devas daŭri. Li jam lernis tiun teknikon dum la pasinta reĝimo. Li ne estis elektata kiel noviganto, sed pro generaciaj kialoj ; li apartenas al la generacio de la Reĝo. Ĉi tiu reĝo estas generaciista monarko. Resume,

mi jam preskaŭ ne havas monon kaj mi ŝatas nek la ideon buĉi la bestojn nek tiun pri mia fino".

Lia amiko lin skribis: "ne akceligu la buĉon de la bestoj. Kiam vi restos senmone, alportu ilin ĉi tie, en mian bienon. Mi ne vivas kiel socialisto, kvankam mi daŭre estas tio, sed ja miaj kvin hundoj, kiuj havas sufiĉajn viv-rimedojn, ĉiujn mi traktas tutegale kaj ne ekzistas klasoj inter ili. Rilate la pafon kontraŭ vian tempion, mi neniam kredis tiun ideon, do mi ne timas pri via vivo".

"Via letero estas perfekta –li respondis-. Mi preferas aŭdi vian oferon pli bone nun, kiam mi ne bezonas vin, ol kiam ĝi estos tute necesa, ĉar tio estus humiligo. Hodiaŭ, ĉe mia ĝardeno, sidita sub vito, tiel densa, ke mi devis tranĉi la grapulojn antaŭtempe por eviti la vespojn, mi diras vin, ke la vivo ridetas min kaj verŝajne ni eraris rilate al Suárez, ĉar li ankaŭ ne estas tute certa pri tio kio okazos".

Pasis du monatoj sen letero de la ekziliita amiko. Li temis pri lia vivo. Li jam estis sufiĉe olda, kun tiu aĝo li povus same vivi aŭ morti.



Ĉu li jam forpasis? Se jes, kial lia sekretariino ne malfermis miajn leterojn? Kaj kial lia familio, tiu edzino, tiuj gefiloj, kiujn li feliĉigis, sciigas nenion al mi?

Li skribis al la hispana konsulo. Aperis registrita neniu hispano tiel nomita, li respondis lin. Li pensis ĉu li ŝanĝis sian nomon. Li klarigis, ke temis pri post-milita ekziliito kiu atingis sufiĉan monon. Li posedis fabrikon iuloke, bienon en alia loko, familion kaj grandan prestiĝon... Neniam estis konata hispano en tiu loko sub tiuj kondiĉoj, oni denove diris al li. Li eĉ skribis al la ambasadoro, kiu respondis kun tiuj samaj informoj. Li eksuspektis, ĉu la ekziliito iufoje ekzistis, kaj pri tiuj leteroj, kie estis la ricevitaj leteroj? Li eĉ pensis, ĉu la ekziliito ne estis li mem? Post ĉi tiu suspekto li eĉ pensis, ke nun kiam la alia ne ekzistas, li povas vidi sin kiel li reale estas.

Nun, kiam li jam sentas sin kompleta, aperas lia vizaĝo sen soleco. Li instigis la hundojn, sed ili, anstataŭ boji, movis la vostojn amikeme, kaj la katoj? Tie li estis, sur la tegmento, kiu io en la buŝo, ĉu birdo? Ĝi neniam

revenis hejmen, ĝi ekziliiĝis kun la leteroj de la ekziliita.

Ĉu eblas organizi la 10an Andaluzan Kongreson de Esperanto?

Grupo da sevilaj samideanoj laboras en la organizado de la 10-a Andaluza Kongreso de Esperanto laŭ la jenaj proponoj:

- La Kongreso okazus en la urbo Sevilo la sabaton 30an de oktobro kaj verŝajne ankaŭ dum la 31-a de oktobro. Ĉi tiel, oni profitus longan semajnfinon kiu finiĝas la lundo 1-a de novembro (festo-tago en Andaluzio).

- La organizantoj de la Kongreso ne pripensas grandajn aktojn, male, oni organizus nur eblan prelegon ĉe publika biblioteko de Sevilo pri Esperanto, samtempe al la oficiala donaco de la "Granda Vortaro Hispana-Esperanto" al tiu biblioteko. Dum la Kongreso oni organizus unu aŭ du prelegojn en esperanto pri malsimilaj temoj, inter ili jam proponita "*Eblecoj instrui esperanton en la hispanaj universitatoj*".

- Se ni havas favoran respondon de la Parlamento de Andaluzio, la kongresanoj povus viziti ĝin. Oni profitus por donaci al la Parlamento de Andaluzio esperant-lingvan version de la Aŭtonom-Statuto de Andaluzio.

- Dum la kongreso funkcius libro-servo kie oni povus aĉeti librojn kaj materialon en esperanto.

- Dum la kongreso povus okazi la ĉi-jara eksterordinara ĝenerala asembleo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Ĉi-tiel oni atingus pli grandan ĉeeston al tiu asembleo kaj do, plian partoprenadon en la komunaj decidoj de nia asocio.

- Se eble, fina komuna manĝo-festo povus okazi por fermi la kongreson.

Se Vi trovas ĉi proponojn interesaj ne hezitu kontakti kun unu el la jenaj adresoj: esperanto_sevilo@yahoo.es ; esperanto14@supercable.es ; noelnadlor@hotmail.com ; ni atendas viajn proponojn, sugestojn kaj se vi povas veni en Sevilon ne rezignu vian partoprenon en la 10-a Andaluza Kongreso de Esperanto.

ANDALUZA KUIRARTO

SKOMBRO KUN VERMIĈELOJ

Temas pri tipa manĝaĵo de la kadiza provinco, ĉefe de la marborda zono, ĉar oni miksiĝas la skombron, ofta fiŝo ĉe la kadiza maro kaj la vermiĉelojn, produkto ellaborata en tiuj industrioj starigitaj de italoj dum la 18a jarcento en Kadizo. Ĉi tiun manĝaĵon preparis la maristoj en la fiŝkapt-ŝipoj mem, kaj de tie ĝi iris en la kvartaloj kie loĝis la fiskaptistoj.

Jen la ingredientoj:

- Skombro (1 kilogramo)
- Vermiĉeloj (½ kilogramo)
- 1 cepo
- 2 verdaj paprikoj
- 3 ajleroj
- 4 ruĝaj tomatoj
- ½ glaso da oleo
- Salo
- Akvo



Jen la ellaborado:

Purigu tre bone la skombrojn, tio estas: demetu la ventron kaj la kapon. Tranĉi ĝin laŭ rond-pecoj (proksimume 4 centimetroj).

Ene de poto, sur fajro, metu oliv-oleon kaj la cepo jam tranĉita. Kiam ĝi rostetiĝos metu la verdajn paprikojn kaj la ajlerojn, ankaŭ tranĉitaj. Movu ĉion tre bone kaj poste adiciu la tomatojn, kompreneble jam tranĉitaj kaj senŝeligitaj.

Kiam la friktaĵo estos origita versu abundan kvanton da akvo, ĉio devas ekboli. Tiam metu la vermiĉelojn kaj la skombron.

La manĝaĵo estos preparita kiam la vermiĉeloj estas molaj kaj ekzistas sufiĉa kvanto da buljono.

Manĝu ĝin varme.

Informu al ni pri la plej tipaj andaluzaj receptoj, ni tutplezure kaj bonapetite publikigos ilin.

Rubriko: ANDALUZA KUIRARTO
Gazeto Andaluzio
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba

esperanto14@supercable.es

FLAMENKO

LA PAQUERA DE JEREZ

Pasintnumere ni parolis pri la morto de la kantisto Juanito Valderrama, ĉi-numere ni devas bedaŭri la forpason de alia granda kantistino Francisca Méndez Garrido, La Paquera de Jerez (prononcu *Pakera*), la reĝino de la bulerioj. Verŝajne la virina voĉo plej pure flamenka.

Ŝi estis profesia kantistino ekde sia deksepa vivojaro kaj jam tiam, en Jerezo sia naskiĝurbo, ŝi elstaris pro sia forto, energio kaj kuraĝo sur la scenejo. Ŝi devenis de flamenk-kantista familio "Los Méndez" ankaŭ konataj kiel "Los Paqueros".

Post Jerezo ŝi debutis en Madrido kie ŝi kantis en la plej gravaj flamenkejoj, ĉefe en "El Corral de la Morería". Poste ŝi vojaĝis tra Hispanio partoprenante en diversaj flamenkaj spektakloj kun aliaj elstaraj kantistoj. Fine de la 70a jardeko ŝi kantis nur en festivaloj kie ŝi atingis grandajn sukcesojn kaj ricevis multnombrajn omaĝojn. Tiel, okaze de la Renkontiĝo de Flamenka Arto en Sevilo en la jaro 1984 kaj en la 3a Flamenka Renkontiĝo de Madrido en la jaro 1986.

Krom nombraj premioj ŝi atingis elstarajn opiniojn, Juan Luis Manfredi diris pri ŝi *Ŝi estas la reĝino de la bulerioj, superba kiam ŝi kantas jerezajn kantaĵojn. Ŝi superregas la takton.* Juan de la Plata skribis *La*



Paquera regas la buleriojn kaj la fandangojn, sed ŝi kapablas ornami ilin kun cigana sento. Ŝia jereza voĉo estas energie brava.

KIO ESTAS LA BULERIO?

Oni diras, ke la bulerioj naskiĝis en la vilaĝoj de la kadiza marbordo. La bulerioj estas kantataj kaj dancataj, kaj oni ne povas kompreni ilin sen ambaŭ flamenkaj manifestacioj, kanto kaj danco. La bulerio devenas de la "soleá", kvankam la ritmo estas pli viveca. Ĝenerale la temoj kantataj en la bulerioj parolas pri amo aŭ malamoj.


Allí ya no hay ná que vé
porque un barquito que había
levantó vela y se fue.

Ven acá, falsa y refalsa,
falsa, te vuelvo a decí.
El día que me vendiste,
żCuánto te dieron por mi?

TURISMI EN .... *ALMODOVAR DEL RIO*

Se Vi vojaĝas de Sevilo ĝis Madrido kelkajn kilometrojn antaŭ atingi Kordovon, Vi vidos monton kaj supren belegan kastelon. Trans la monto aperas la vilaĝo Almodovar del Rio, unu el la plej belaj vilaĝoj en la provinco Kordovo.

Oni diras, ke temas pri la romia vilaĝo *Carbulo* pri kiu parolas Plinio. La araboj konstruis kastelon sur tiu monto kaj ili nomigis la zonon *Al-Mudawwar*, kies signifo estas *la ronda*, pro la formo de la monto ĉirkaŭ kiu stariĝis la vilaĝo. Ferdinando la 3a konkeris la urbon por la kastilia regno en la jaro 1240.



Blazono de Almodovar del Río

La kastelon kaj la vilaĝon posedis, post la kristana konkero, diversaj sinjoroj, inter ili Gonzalo Fernández de Córdoba, *la Granda Kapitano*, ĝis kiam definitive la reĝo Filipo la 3a vendis ilin al Francisco del Corral kontraŭ 16 milionojn da maravedoj.

Ĉefaj Vidindaĵoj

La Kastelo de Almodovar

Viziti Almodovar del Río signifas viziti ĝian famegan kastelon. Ĝi estas unu el la plej belaj monumentoj en la kordova provinco kaj, laŭdire la unue videbla se oni atingas Kordovon aviadile, ĉar ĝi estas proksime al la kordova flughaveno.



Kastelo de Almodovar del Río

La kastelon de Almodovar starigis la araboj tuj post la konkero de la Ibera Duoninsulo. Abd el Malik ben Qatan estis la unua sinjoro de la kastelo, nomumita rekte de la Kalifo de Damasko en la jaro 741. Poste ĝi apartenis al la Kordova Kalifejo kaj al la sinsekvaj tajfaj regnolandoj de Kordovo, Karmono, Sevilo kaj eĉ Toledo. En la 10a jarcento la kordova kalifo Abd-Al-Rahm la 3a ampleksigis ĝin.

Post la kristana konkero de Kordovo en la jaro 1240 la kastelo ruiniĝis kaj

ĝi pèrdis sian grandan valoron kiel defendilon de la urbo Kordovo.

Jam en la 20-a jarcento la posedanto de la kastelo estas la Grafo de Torralba, kiu en la jaro 1903 decidas rekonstrui ĝin. La laboroj daŭriĝis ĝis la komenco de la hispana intercivitana milito. Hodiaŭ la kastelo de Almodovar estas privata proprietaĵo vizitebla ĉiuj tagoj, escepte marde. Kaj ni ege rekomendas tiun viziton.



Sidejo de la Ateneo de Almodovar

Preĝejo *La Inmaculada:*
Ĝi estas la plej grava religia monumento de Almodovar del Rio. Konstruita laŭ baroka stilo ĝi posedas 4 belaj sonoril-turoj. Ene de ĝi troviĝas bela altar-bildaro starigita de Alonso Cano.

Festoj


La 3-a de majo okazas la festo de la krucoj kaj en tiu sama monato la pilgrim-festo de la Virgulino de Fatima. La foiro de Almodovar del Rio okazas de la 19-a ĝis la 22-a de aŭgusto honore al la Virgulino de la Rosario.

Tipaj Manĝaĵoj

La tipa kordova *salmorejo* oni preparas en Almodovar del Río kun engraŭloj. Tipa kaj bongusta estas la viando-buloj preparitaj sur ŝinko-buljono.

Almodovar kaj la dig-lago *La Breña*

Tre proksime al Almodovar del Río troviĝas la dig-lago *La Breña* (prononcu "la brenja"). Ĝi estas paradizo por la fiŝkaptistoj kaj por tiuj kiuj amas la navigad-sportoj, kiel la vel-tabulado. Ĝi ankaŭ estas bela loko por praktiki la ruran turismon.



Aer-vidado de la dig-lago *La Breña*

Venont-numere

TURISMI EN....

Alcalá la Real (Jaeno)

MISTEROJ KAJ LEGENDOJ DE ANDALUZIO

j.m.r.h.

Fantomo ĉe Granada Palaco

Fine de la jaro 1989 la granada ĵurnalo *IDEAL*, informis pri strangaj okazintaĵoj en la palaco kie sidejis la Provinca Deputitaro de Granado. Laŭ la funkciuloj tie laborantaj okazis strangaj bruoj, malaperis objektoj, okazis subitaj ŝanĝoj de temperaturo. Same, la privataj gardistoj kiuj laboris dumnokte aŭdis terurajn sonojn, ili vidis kelkajn pordojn antaŭe zorgeme fermitaj aperis post kelkaj minutoj tute malfermitaj kaj oni aŭdis la tajpilojn ekfunkcii, eĉ hundo kiu akompanis la gardistojn en lia laboro forfuĝis terurigita. Sed, kio okazis en tiu palaco?

La membroj de parapsikologia grupo de Granado nomita "Omega" petis permeson al la aŭtoritatuloj por resti dum unu aŭ du noktoj en tiu palaco kaj tiel informi pri tio kio oni povus vidi, aŭdi aŭ senti. Ne estis necesaj du noktoj, sufiĉis nur unu. La membroj de tiu grupo vidis strangajn kaj malgrandajn lumetojn ene de la korto, sed tio ja povus esti nur la reflekto de la lun-lumo sur la akvo aŭ la planko. Laŭ informoj de la membroj de tiu grupo la bruoj estis konstantaj ĝis kiam je alta horo de la nokto aperis nebula kaj frosta silueto. Unu el la membroj de la parapsikologia grupo stariĝis antaŭ tiu stranga figuro kaj li sekvis ĝin kun mezurilo de magnetaj kampoj enmane. La silueto malaperis ene de muro kaj kiam li alproksimiĝis la mezurilon tuj apud la muro, lia mano ricevis malgrandan elektran malŝargon. Kiam la sango malaperis ĉiuj povis vidi la mangrandan vundon en la mano kiu tute similis al la mordo-vundo de du malgrandaj dentoj. La membroj de la grupo tuj eliris el la palaco. Kiam ili aŭskultis la sonojn de la sonbendigiloj de ili uzataj dum tiu nokto la surprizo estis pli terura, oni aŭskultis tre klare kaj laŭte la frazon *Vi bedaŭros.*

Laŭ informoj de la masonistoj kiuj laboris dum la rekonstruo de la palaco, oni trovis restaĵojn de fetoj enmurigitaj. La noticoj dise sciigitaj pere de la loka ĵurnalo impresis la tutajn urbanoj kaj eĉ la Provinca Deputitaro decidis translokiĝi en alian sidejon kaj definitive oni mason-fermis la konstruaĵon.

Kelkajn jarojn poste, oni decidis starigi tie la oficejon de la Publika Katastrejo, tiam la masonistoj kiuj rekonstruis la oficejojn denove plendis pro la konstanta malapero de la laboriloj, strangaj bruoj kaj subitaj sanĝoj de temperaturo, tamen la konstru-entrepreno ordonis al la masonistoj informi pri nenio al la ĵurnalistoj.

KOMERCAJ PETOJ KAJ PROPONOJ

Litovio

✓ Litovia ekonomio en lasta jaro post ioma da rompo komencis kreski alten. Mi posedas kompanion kiu akceptus proponojn kunlabori en turisma kampo (hoteleto, ekskursoj, ripozo en vilaĝo, biciklado tra la pitoreskaj lokoj de Litovio, konstruado de ripozejo apud lago aŭ vilaĝo); agrikulturaj aferoj (kreskado kaj vendado de legomoj, fruktoj, bestbredado), vendo de diversaj varoj (aŭtopartoj, manĝovaroj, ĉiutagaj varoj). Kontaktu Stasys Kruzinauskas, Vilkaviskis, Litovio; rete: kruzinauskas@sala.lt aŭ stkruz@lrs.lt

Vjetnamio

✓ Ni estas azia monda kompanio. Ni produktas kaj komercas modajn vestojn, kemiaĵojn kaj kompositplaston. Nia kompanio volote helpas diverslandajn esperantistojn, kiuj dezirus investi en aŭ vojaĝi al Vjetnamio. Ni esperas baldaŭ ricevi intersiĝon de esperantistoj en la mondo. Bonvole turnu vin al: Nguyen Thi Thanh Van, retadreso tvan7874@yahoo.com, Ho CHI Minh, Vjetnamio.

Ĉinio

✓ Por komercistoj de konstrumaterialoj kaj koncernaj entreprenistoj, mi ofertas emajl-kolorigan sablon. Estas novtipa malmola materialo de konstru- kaj ornamad-painto, medioprotekta, bonkvalita kaj abund-kolora, brulo-, akvo- kaj korodorezista, farata en Wuhan, Hubei. Kontaktu: Ji Ding, rete dingjiws@yahoo.com (fakdelegito de UEA).

✓ Mia kompanio ĉefe produktas diversajn kovrilojn de seĝoj kaj sofoj. Kutime niaj laboristoj, kun tradicia metodo, mane-brodas la kovrilojn per lando-fadeno. Ni iutempe ankaŭ komercas je aliaj aĵoj, ekzemple: tablo-brodaĵoj, tapiŝoj, ĵerzoj, tkp. La aĵoj nun ĉefe estas eksportataj al Egiptio, Saŭd-Arabio, Unuiĝintaj Arabaj Emirejoj.
Direktoro: Wang Chen-zhi, Yantai-a Verd-Stela Arta Kompanio Limigita, No. 89-5-1. Huagshan str. Yantai, Shandong Ĉinio CN-264001, rete: grenstar@publik.ytptt.sd.cn

MONDA KOMERCADO PER ESPERANTO

Se alĝustiĝas al unu el la ĉi subaj situacioj, vi estas invitata enskribiĝi al la Yahoo-laborlisto per-esperanto-komerco-informoj:

1.. Vi deziras gajni monon per internacia komerco, tio estas, vi volas profesie agadi sur la kampo de importado kaj eksportado, ĉu kiel makleristo ĉu kiel rekta importanto/eksportanto kaj volas adopti Esperanton kiel laborlingvon. Eventuale vi eĉ pretas fondi entreprenon de internacia komerco;

2.. Kvankam vi ne volas profesie kaj ĝŝfunde agadi sur la kampo de internacia komerco, vi pretas iel ajn kunlabori por efektivigi negocojn, por ekzemplo helpante per loka kontakto kun entreprenoj esperantistojn, kiuj volas profesie agadi, aŭ plenumante aliajn taskojn farendajn, laŭ la laborprogramo starigita de la membraro de la laborlisto;

3.. Vi estas komercisto (aŭ intencas baldaŭ esti) kaj eventuale interesiĝos pri importado aŭ eksportado de varoj enkadritaj en via laborkampo;

4.. Vi estas estrarano de esperanto-asocio kaj vi kredas, ke internacia komerco de varoj por konsumado (vestaĵoj, ŝuoj, manĝaĵoj, parfumoj, kodiskoj, komputilaĵoj, artaĵoj,hejmaj utilaĵoj ktp ktp ktp), je malgranda skalo, povos esti bona enspezofonto por via organizaĵo.

5.. Vi apartenas al la monda movado de justa komerco, kaj kredas ke Esperanto povos roli kiel unu el la laborlingvoj por via organizaĵo de justa komerco.

Nu, por enskribiĝi bonvolu sendi malplenan mesaĝon al per-esperanto-komerco-informoj-subscribe@yahoogrupos.com.br . Tiam vi aŭtomate ricevos demandaron, kiun vi devos plene respondi por efektivigi vian enskribiĝon al la laborlisto.

Bonvolu atenti pri du detaloj:

a.: Tiu grupo ne celas ĝustadire diskutadon, sed konkretan agadon. Diskutado pri strategio, teorio kaj statistikoj pri internacia komerco, prezentado de fakaj tekstoj kaj similaĵoj estas nur rimedoj por atingi la celon: evoluigi la internacian komercon per Esperanto. Do iel ajn vi devos konkrete kunlabori, ĉu kiel makleristo, ĉu komercisto, ĉu redaktanto, ĉu tradukisto, ĉu loĝistika apoganto ktp

b.. Tute ne estas permesate dissendo de spamo aŭ de mesaĝo ne koncernanta la celaron de la grupo.

Fabrício Valle Brazilo

Ne forgesu aboni Vian kotizon por la kuranta jaro 2004 (kaj tiun de la jaro 2003 se Vi tion ankoraŭ ne faris). La aliĝ-kotizo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kostas 15 eŭroj. Uzu unu el la jenaj banko-kontoj:

- BBVA: 0182 4106 71 0207160717
- Caja General de Ahorros de Granada: 2031 0225 54 0100187657

Bv. post pagi Vian jaran kotizon ne forgesi sciigi al la asocio Vian pagon. Uzu por tiu informo nian adreson en Malago, en Kordovo aŭ nian elektronikan adreson.

La venonta numero 74a de la revuo GAZETO ANDALUZIA aperos dum la unuaj semajnoj de la monato aŭgusto 2004.

Viajn kontribuaĵojn, opiniojn, sugestojn, kritikojn, kion ajn. bv. sendi al nia adreso:

GAZETO ANDALUZIA, Apartado de Correos 3142, 14080 Córdoba

Al tiuj membroj kaj simpatiantoj de nia asocio kiu profesie rilatas al la jura mondo ni sciigas, ke ni jam preparas la 8an numeron de la revuo *JURA TRIBUNO INTERNACIA*, oficiala organo de Esperanta Jura Asocio eldonita kunlabore kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Verŝajne ĉi nova numero aperos okaze de la ĝenerala asembleo de Esperanta Jura Asocio, okazonta kadre de la 89a Universala Kongreso de Esperanto, Pekino (Ĉinio) de la 24a ĝis la 31a de julio. Se Vi deziras ricevi ekzempleron de tiu nova numero kontaktu kun nia asocio. esperanto14@supercable.es

---

Solvo al la krucvortenigmo proponita en la pasinta numero.

I	D	E	O	J	N
M	E	R	G	O	X
A	B	O	N	I	S
G	E	X	I	R	I
O	T	O	J	K	X
S	I	N	X	X	X

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas la disvastigon de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.
Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro
Prezidanto : Andrés Martín González
Vic-Prezidanto: José Francisco Martín del Pozo
Sekretario: Jesús García Martínez
Kasisto: Julio Herrero Segura
Voĉdonanto pri Propagando: José María Rodríguez Hernández
Delegito pri rilatoj kun Blinduloj: Alejandro Iglesias Campos.

Adreso: C/ Armengual de la Mota 33, 4D E-29007 MÁLAGA
E-Adresoj: esperanto@ciudadfutura.com
esperanto14@supercable.es
esperanto@navegalia.com

Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net

T Tajfo

Tajfo (el la araba tá` ifa "*grupo, bando*"): oni nomas tajfo-regnoj tiujn teritoriojn naskiĝintajn en Al-Andalus post la intercivitiana milito okazinta en 1009-1031, kiu anstataŭis la kordovan kalifujon, ĉiu el ili regata de aparta reĝo.

Antonio MARCO BOTELLA *Lirikaj Perloj de Al-Andalus*. Zaragoza (Hispanio) 1995. Paĝo 319-a.

La apero de tiuj tajfo-regnoj sur la teritorio de la eksa kordova kalifujo estis la pruvo de la internaj luktoj kiuj dividis la hispanajn islamanoj en tiuj jaroj. Ĉiu tajfo identiĝis kun malsimilaj povantaj familiojn, la idoj de *Al-Mansur* en Valencio, la familio de la *tujib-idoj* en Zaragozo, la idaro de *Banu Birzal* en Karmono, la *abadi-idoj* en Sevilo, la *hamud-idoj* en Malago, la *Ziri-idoj* en Granado.... ktp.

ESPERANT-LINGVAJ VORTOJ KIUJ, HISTORIE AŬ ETIMOLOGIE, DEVENAS DE ANDALUZIO.